# El liberecana vidpunkto

1

**2010a julio**
Gazeto el neantaŭvidebla eldonofteco
Eldonas: Kultura Societo *Interhelpo*
Retpoŝto: interhelpo@gmail.com
Laŭleĝa deponnumero: B-32995-2010


CC BY NC SA

# Kiu regas?

La politikuloj, sukcesintaj ĉe la balotadoj, ne estas tiuj, kiuj regas, ili estas nur pajlhomoj, kiuj vivas el dolĉigi al ni la pilolon de la decidoj, kiujn prenas la veraj registoj de la mondo: la financistoj kaj la plurnaciaj entreprenoj.

Tiujn, kiuj prenas la plej gravajn decidojn, kiuj tuŝas nian estonton kaj la estonton de la homaro mem, ni ne elektis demokratie, sed ili sin altrudas per la povo de "sia" mono.

Ja, ni vidis kiel la Internacia Monunua Fonduso kaj la Monda Banko altrudis ilian leĝon al Grekio, al la Zapatero-a registaro kaj al la pintkunveno ĉe Toronto. Kiam vi balotis pro la IMF? Kiam vi partoprenis referendumon pri la decidoj, kiujn oni prenu, por eliri la krizon? La kapitalo altrudas sian diktatorecon kaj la politiko estas farso.

Estas krizo, ĉar la ekonomia proceso havas neniun demokratian kontrolon. La "eliron" el la krizo pagas ni gelaboristoj, ĉar la politikuloj estas nenio krom ĉarlatanoj dungitaj de la kapitalistoj. Kaj ni gelaboristoj esperas la solvon el la manoj de tiuj, kiuj kreis la problemon, ĉar ni timas alfronti la veron kaj ni preferas lasi nin trompi per la amaskomuniloj.

La vero estas, ke la kapitalistoj riĉiĝas pagigante al la laboristoj krizon, kiu jam daŭras 100 jarojn. La vero estas, ke la kapitalismo estas nenio krom trompo al la gelaboristoj kaj al la popoloj. La vero estas, ke la kapitalismo estas la krizo de la homaro.

Nur, kiam la popoloj regos sin mem, nuligante la ŝtaton kaj flankenlasante ĉiajn politikulojn, kaj faros kolektivan proprieton el la produktrimedoj kaj la laborproduktoj, tiam la ekonomio povos esti demokratie regata kaj la organizado de la socio respondos al la komunumaj interesoj anstataŭ al tiuj de la trompistoj kaj la spekulaciistoj.

**Dum la kapitalo elsangigas vin, ne esperu salvon el la politikuloj. Nur la memorganizo de la socio montras eliran vojon.**

# La kolektivigoj

La militista ribelo je julio de la 1936a okazigis leviĝon de la proletaro kaj de la popolo, kiu preterpasis la simplan defendon de la respublika sistemo. Tuj, kiam la militista puĉo fiaskis, komencis spontanea proceso —kiu ne nur ne respondis la dezirojn de la Respubliko, sed kiu eĉ kontraŭdiris la agvortojn de la sindikatoj— pri transformigo de la socio kaj de la vivo entute. Tiu ĉi eksplodo el libereco kaj ĝojo je la ekapero de nova socio havis materian bazon tuj perceptebla: la kolektivigoj. Oni kolektivigis fabrikojn, kampojn, trinkejojn, kinejojn kaj eĉ frizejojn. La kolektiviga febro estis la febro de la revolucio, la febro de sklava popolo, soifanta atingi sian revon organizi kaj regi sian propran vivon.

La kolektivigo signifis senproprigi la entreprenistojn kaj komenci produkti sub direkto kaj kontrolo de la laboristoj mem. La industria *kolektivo* strukturiĝis tiel: *ĝenerala asembleo*, kiun partoprenis ĉiuj laboristoj de la entrepreno kaj kiu prenis la plej gravajn decidojn: kion, kiel, kiom kaj por kio produkti, *entreprena konsilo*, kiu efektivigis la decidojn de la ĝenerala asembleo kaj esploris la teknikajn aferojn rilate al la produktado, kaj *sindikata komitato*, kiu gardis la interesojn de la laboristoj kiel produktantoj. Tiuj ĉi kolektivoj unuiĝis inter ili pere de la *grupigoj*, kiuj havis la saman organizan strukturon. Tiuj ĉi grupigoj formiĝis ĉu kun entreprenoj el la sama industribranĉo (per fandiĝo de la entreprenoj) aŭ kun entreprenoj, kies produktoj interrilatas.

La kolektivigita produktado montris ne nur la vojon al la nova socio (kiun la faŝistoj dinamitis), sed ankaŭ demontris: 1) ke racia produktado bezonas neniun entrepreniston kaj ke la laboristoj solaj estas plene taŭgaj organizi la produktadon, 2) ke per la kolektivigo de la industrio oni atingis plibonigojn de la produktado tiel ĉe la teknika kiel ĉe la administra flankoj, kiuj superis de longe la antaŭan entreprenistan organizon, 3) ke la labor- kaj vivkondiĉoj de la laboristoj povas pliboniĝi rimarkinde sen damaĝi la produktadon de la socie bezonaj varoj, 4) ke, kiam la laboro estas regita kaj kontrolita de la laboristoj mem kaj celanta la satigon de la homaj bezonoj, ĝi estas nenia sklaveco.

Tamen la Respubliko kaj la politikaj partioj taskiĝis bremsi tiun unikan sperton je la tuta historio (tiel for de la kapitalismo kiel de la soveta ŝtatismo) atendante ĝis tiam, kiam la frankistoj detruis ĝin ĝisfunde.

Ni proponas al vi etan enkondukan bibliografion:


CASTELLS DURAN, Antoni: «Las colectivizaciones en Catalunya (1936-1939)», *Solidaridad Obrera*, número especial Centenario de la CNT (2010) 18-19

LEVAL, Gastón: *Colectividades libertarias en España*. Madrid: Aguilera 1977

MINTZ, Frank: *Autogestión y anarcosindicalismo en la España revolucionaria*. Madrid: Traficantes de sueños 2006

SEMPRÚN-MAURA, Carlos: «Las colectivizaciones en Cataluña» en *Revolución y contrarrevolución en Cataluña (1936-1937)*. Barcelona: Tusquets 1977

# Militista diktatoreco

Laŭŝajne jam ne sufiĉas la piedpilkado, la televidmelodramoj kaj la gazetaro tn de la koro por elteni la civitanaron je mondo plenplena el iluzio, fantazio kaj koloroj. Tial nun oni bezonas la helpon de iu el la plej malnovaj iloj, kvankam ja el provita efiko, kiujn havas la sistemo: la naciismo, la patrujismo. **Ĉion por la patrujo** (kataluna ĉi-okaze). Oni denove tuŝas la senteman koron por kaŝi la realan (kaj estontan) situacion de la laboristaro. Kaj tio plej malbona estas, ke ni denove falos en la saman kaptilon kaj, dum certa tempo, la gravaj problemoj de nia socio restos kaŝitaj de la brilo el Statuto, kiu postulas venĝon.

Kion fari nun? Memvideble oni devas malŝpari eĉ ne unu solan sekundon por analizi la verdikton nek la sintenon de la Konstitucia Tribunalo (ĉu eble indas peni por analizi la laŭrajtecon de la frankistaj verdiktoj? Ĉu ne okulfrapas, ke tiu ĉi sistemo ne estas tiu nia?). Nia nursola ago ebla estas denonci fojon post fojo, ke la nunan krizon kaŭzas la ena strukturo mem de la kapitalismo kaj ke, tiom kiom ni suferos ĝin, ni rajtas esperi nenion alian. Kaj ankaŭ reliefigi, ke ni iros plimalbonen, ke temas ne nur prokrastigi la emeritaĝon, sed ke oni malplibonigas nian vivkvaliton samtempe ol oni mortigas nian planedon. Kaj oni ne parolu pri la loĝantoj de la tria mondo. Kio zorgigas nin? Ĉu tio, ke ni ne havos tridekcolan televidilon por spekti la Mondpokalon? Ĉu nepras memorigi, ke ĉiutage malsatmortas dekoj da miloj da homoj?

Kaj finfine nepras diri laŭtvoĉe, ke la politikistoj servas nur por elteni tiun ĉi sklavecan sistemon kaj ke ili prifajfas nian opinion: ili scias, kiun ili devas obei. Tie ĉi estas la deklaracio de Jose Durao Barroso, nek pli nek malpli ol la prezidanto de la Eŭropa Komisiono, kiu, sen pliaj ceremonioj, asertis ĉe kunveno kun la Eŭropa Sindikata Konfederacio (ETUC) je la pasinta junio **«se oni ne enkondukas la arojn el aŭsterecrimedoj, ĉe tiuj landoj povus malaperi la demokratio tiel, kiel ni konas ĝin nun. Estas neniu alternativo plu»**, kaj li celis Hispanion, Portugalion kaj Grekion. Li diras sunklare, ke, se ni klopodas kontraŭstari tiujn rimedojn, ili altrudos militistan diktatorecon.

Antaŭ tio, ĉu la anarkisindikatistoj devas malŝpari eĉ unu solan sekundon por analizi la verdikton pri la Statuto? Ne, estas aferoj senfine pli gravaj, por kiuj peni.







Ekzemple, por ke tiuj ĉi tri fantomoj (Georgios Papadopoulos, Antonio de Oliveira Salazar kaj Francisco Franco) ne reenkarniĝu je nia epoko.

Kaj certigi, ke ni ne falos ree en la kaptilon defendi ilian demokration, sed ke ni starigos tiun nian: la rektan demokration sen politikistoj nek registaroj.

**Ili regas ankoraŭ... ĉar vi obeas**

# Kolektivigi la ekonomion

Ĉi-monate ni festas denove la datrevenon de la socia revolucio de la 1936a en Hispanio. Tiam, kiel nun, estis du grandaj sintenoj antaŭ la krizo: tiu el tiuj, kiuj sin okupas pri la patria unueco, la nacia liberigo, la respubliko, la monarkio kaj pliaj politikaĵoj, kaj tiu el tiuj, kiuj batalas por plibonigi la vivkvaliton de la popolo.

Niaj avoj donis al ni historian instruaĵon: kolektivigi la ekonomion estas la ĉefŝlosilo de la socia ŝanĝo kaj ili ne atendis ĝis kiam la politikistoj komprenos tion. Unue la kolektivigo, poste la respubliko kaj, se la respubliko kontraŭas la kolektivigon, nursola kolektivigo.

La teknologiaj progresoj, la sciencaj trovoj kaj la naturaj rimedoj devas servi ne por pligrandigi la profiton de la ekspluantoj de alies laboro, sed por plibonigi la vivon de la popolo entute.

La ekonomikistoj kaj la politikistoj jam kunsentis: ne eblas kunaranĝi la pligrandigon de la kapitalistaj profitoj kaj la plibonigon de la vivkvalito de la popolo. Ili diras "endas streĉi al si la zonon", ni respondas "endas kolektivigi".

Nepras sekvi la ekzemplon de niaj avoj: estas la kolektivo, kiu devas decidi kion kaj kiel oni produktas. Ni ne rajtas daŭrigi la detruon de niaj vivoj kaj tiuj de niaj posteuloj kune kun tiu de la planedo mem per sensaĝa kurso de produktemo kaj konsumemo por ke la mondmastroj riĉiĝu ankoraŭ pli.

Tial, nun pli ol neniam, niaj celoj nepre estu la plibonigo de la vivkvalito (labori malpli kaj vivi pli bone), la nuligo de la ŝtato (la politikistoj iru en fabrikon) kaj la kolektivigo de la ekonomio.

**Antaŭ la nuna krizo de la ekonomio, antaŭ la sistema krizo de la kapitalismo, antaŭ la civiliza krizo de nia erao, malfermiĝas unusola vojo, inda esti laŭirita: tiu de la rekta demokratio kaj la kolektivigo de la ekonomio.**

